



# Komencanto



*Oni diras, ke vi estas reĝo de la jaro...*



*Bildon sendis Naila Sahretdinova [Voroneĵ, Rusio]*

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

Januaro  
- februaro

**kiel Georgo Handzlik, vaste konata E-bardo, iĝis esperantisto**  
**verkoj de niaj legantoj – gramatikaj lecionoj de J-L Tortel**  
**diversaj ondoj el bunta mondo – aforismoj, ŝercoj, anekdotoj**  
**la praktiko – korespondu!**



## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

**UEA** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando

**REU** Rusia Esperantista Unio, 105318, Rusio, Moskvo, p/k 57.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 8, EE 93812, Kure-saare.

**Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

**Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-saie, 75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villaresi, 38, 20143, Milano.

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

**Kanado** Yves Bellefeuille, Kanada Esperanto-Asocio, PO Box 2159, Sidney, BC, V8L 3S6

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35, Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH -- 4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Ni ĝojas saluti vin en la unua kajero de "Komencanto-2008", kiu, kiel vi rimarkis, havas nun la plibonigitan aspekton. La renoviĝo aperis kiel provo adapti la revuon al modernaj nuntempaj postuloj. Ĝi aperis ankaŭ dank'al la subteno de REU (Rusia E-Unio), kiun la revuo havas ekde tiu ĉi jaro. Sed la strukturo de enhavo de "K" restas sen iuj radikalaj ŝanĝoj kaj vi trovos en ĝi ĉiujn jam funkciajn rubrikojn.

Por la novaj aliĝintaj legantoj, kiujn ni bonvenigas, verŝajne indas akcenti, ke nia revuo celas diversspecajn komencantojn: komencantajn aŭtorojn kaj novulojn en la lingvo, kiujn ni deziras instigi al aktiva uzado de Esperanto. Per diversaj publikajoj ni penas elvoki ĉe la legantoj emon krei memstare. Ni kredas, ke sur la paĝoj de la revuo la legantoj povas trovi ankaŭ inspiron por la agado por Esperanto. Espereble ĉi-foje inspirigan forton donos al vi la historio pri esperantistiĝo de vaste konata en nia Esperantujo bardo Georgo Handzlik. Trairante pordojn, malfermitajn per Esperanto, li ricevis multajn valorajn vivspertojn kaj multon atingis en sia vivo. G. Handzlik estas persono kun diversaj talentoj: li kreas kantojn kaj muzikon, kiujn admirinde prezentas en multaj siaj koncertoj, verkas originalajn aforismojn, eldonas librojn, in-struas la lingvon. Pleje gravas, ke ĉion, kion li faras por nia lingvo kaj kulturo, faras plenkore kaj sindone. Legu pri li en "Kiel tio komenciĝis".

Komencanto" estas spaco por verkemuloj, kiuj provas krei en Esperanto. Ĉi-foje vi povos legi en la numero interesan kolek-ton de la verkoj: fabloj, rakontoj, poemoj, originalaj kaj traduki-taj. Aliĝu al krea laboro kaj sendu viajn kontribuojn!

Al novaliĝintaj legantoj ni tre rekomendus atenti la gramatikajn paĝojn, kie ni daŭrigas prezenti originalajn, verkitajn en leĝera kaj sprita stilo, lecionojn de J-L Tortel, aŭtoro el Francio. Sendube, ke atenta legado de la lecionoj estos utila al ĉiu, kiu de-ziras perfektigi en la lingvo.

Por legi ion interesan el la diversaj kulturoj, pri diversaj landoj kaj lokoj de la mondo, vizitu la rubrikon "Diversaj ondoj el bunta mondo". Nia malnova leganto V. Opletajev lanĉis ĉi tie aperigon de rakontoj pri naciaj simboloj. Ni invitas vin subteni la ideon kaj kontribui por la rubriko!

Inter la eroj de ĉi-numera enhavo estas ankaŭ humuraĵoj, lingvaj ludoj, adresoj por korespondi k.a.

Ni esperas, ke vi trovos ion interesan por vi!

Dezirante al vi ami, labori, verki, ridi per tuta koro,

*la redakcio de "Komencanto"*

## Komencanto

Dumonata internacia revuo eldonata en kunlaboro kun REU. **2008 numero 1 // (69)**, regule aperas ekde 1998

**Ĉi tiun numeron redaktis Raja Kudrjavceva, enpaĝigis Andrej Grigorjevskij**

**Poŝta adreso:** 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

**retadreso:** komencanto@r66.ru

**abontarifo** por 2008:

*internacia tarifo:* 18 eŭroj

*orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:* 15 eŭroj;

*aerpoŝta aldono* 2 eŭroj

**konto ĉe UEA:** **vkud-a**

*rusia tarifo:* 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041, Екатеринбург, аб. ящ. 132.

*Georgo HANDZLIK - Bardo sen Barbo - vaste konata kiel kantisto de propraj kantoj pri la esperantistoj kaj la movado (Vivu Esperantujo – kasedo 1988; Sur Placo de Ĉiela Pac' – kasedo 1989; Ni tostu la verdan fortunon - Kompakta Disko 1999). Li koncertis dum multegaj E-renkontiĝoj kaj kongresoj en pluraj landoj*

*G. Handzlik estas membro de estraro de EEU. Li ankaŭ instruas Esperanton en internaciaj kursoj, gvidas libroeldonejon "Kleks", kie krom libroj en la pola eldonas esperantajn librojn. Liaj aforismoj „Verdeskaj Pensoj“ estis publikigitaj en revuo "La Ondo de Esperanto".*

## Ĉion mi ŝuldas al Esperanto

**K**iel knabo mi ŝategis kemion kaj fizikon. En la subtegmentejo de mia gepatra domo mi instalas laboratorion. Tie mi ne nur produktis kristalojn de salo, iuvespera eksplodo finis toleremon de mia patro, kiu fermis la ejon. Ne mirige, ke en la liceo mi elektis klason kun larĝa programo de fiziko. Tio tamen signifis ne eksperimentojn, sed tedan kalkuladon.

Iutage direktoro de la lernejo petis, ke mi venigu kvin personojn partopreni vesperan prelegon pri Esperanto. Mi trovis nur tri volontulojn, do volevole mi aliĝis mem. Fine de la prelego, kiun partoprenis ankaŭ la direktoro, venis tempo por demandoj. Estis jam malfrue, ĉiuj estis lacaj, mankis demandemuloj. Do mi decidis ĉesigi la ĝenan silenton.

- Kie oni povas studi la lingvon?

- Eble mi organizos tian kurson, se sufiĉa nombro aliĝos.

La prelego finiĝis kaj post tri semajnoj dum la leciono pri fiziko, kiu jam ne plu estis mia plej ŝatata studobjekto, mi aŭdis de la instruisto, ke mi iru al la direktoro. Kun kaŝata ĝojo mi forlasis la klasĉambron. La direktoro venigis min al la unua leciono de Esperanto. Ni ambaŭ sidis ĉe la sama skribotablo. Mi trankvile partoprenis, ĝis la fino de mia fiziko. Poste mi diris al la instruisto, ke mi pro ia eraro ĉeestas, ĉar mi neniam aliĝis. Tiam ŝi montris al mi la liston. Du komencaj nomoj estis skribitaj per la sama mano. La unua estis la direktoro mem, kaj la dua mi. La direktoro mise komprenis mian demandon dum la vespera prelego. Mi kompreneble decidis ne plu partopreni la kurson. Sed... la venonta leciono okazis ankaŭ dum mia fiziko, kaj la direktoro estis tiom fervora komencanto, ke li donis forpermeson al ĉiuj samkursanoj.



Tiel dum ses lecionoj de fiziko mi studis la internacian lingvon. Tio sufiĉis.

Mi jam englutis la bacion. Dum kvar liceaj jaroj mi studis Esperanton en la lerneja klubo. Mia lando tiam estis dronita en socialisma epoko kaj mi eĉ ne povis revii pri kongresoj. La libroj ankau apenaŭ haveblis, nur dank' al vojaĝoj de mia instruisto. Mi memoras, ke tiam nur dufoje mi parolis kun eksterlandanoj, kiuj vizitis nian urbon. Do mi lernis nur pro la amo al la nova lingvo, sen reala perspektivo paroli kun vivaj esperantistoj. Mi korespondis kun tiom da leteramikoj, ke poŝtistoj en mia ducentmila urbo liveris al mi leterojn eĉ sen adreso, nur kun mia nomo. Mi la sola en la urbo uzis esperantan formon „Georgo“ de mia pola nomo „Jerzy“.

Mi legis gazetojn pruntitajn de la instruistino.

Post iom da semajnoj la direktoro vizitis la kurson ĉiam pli kaj pli malregule. Sed li plu apogis Esperanton en la liceo.

En venontaj jaroj eĉ kelkaj klasoj jam devige lernis la internacian lingvon. En la lasta klaso la instruistino proponis, ke mi ĉe maturiga ekzameno diplomigu pri Esperanto. Por mi, la entuziazmo, estis revo de revoj. Tamen la ministerio ne antaŭvidis tiun eblecon. Tiam ekagis la direktoro – la eterna komencanto. Dum kelkaj monatoj li skribis petojn, vojaĝis al la ĉefurbaj oficistoj kaj finfine mi, la unusola en la lando, rajtis ekzameniĝi pri mia lingvo. Mi skribis disertacion pri Universallaj Kongresoj. Materialojn en mia urbo mi povis trovi nur en la biblioteketo de mia instruistino.

Do, mi komencis korespondi. Mi skribis al delegitoj de ĉiuj kongresurboj. Rezulte mi ricevis pli da dokumentoj, ol mi povis prezenti. La instruistoj de la aliaj fremdaj lingvoj estis mirigitaj, ke post kvar jaroj lerninto povas tiel flue paroli. Kompreneble mi parolis pli flue en Esperanto ol iu ajn lernanto en la franca aŭ la angla. Ili ne komprenis la diferencon. :)

Tio estis komenco. Preskaŭ ĉio, kio okazis poste en mia vivo estis konsekvenco de tiu kurso dum la lecionoj de fiziko.

Mi elektis Krakovon por urbo de mia studado, ĉar tie estis forta E-movado. Mi dediĉis min pli al instruado de Esperanto ĉe diversaj kursoj, ol al la studado ĉe la akademio...

Post du jaroj mi komprenis, ke mi ne volas esti inĝeniero, sed filologo. Mi ŝanĝis teknikan akademion al universitato, kie mi ekstudis polan filologion. Dank' al „Parnasa Gvidlibro“ de Kalocsay kaj Waringhien mi pli bone komprenis poetikon ol iu ajn el miaj kolegoj. Mi konis esperantajn ekzemplojn de versfarado el pluraj lingvoj, dum aliaj studentoj kaj eĉ profesoro povis legi nur polajn poemojn. Pri pola gramatiko mi komprenis pli dank' al modela esperanta gramatiko. Antaŭe mi eĉ ne supozis kiom da komunaj elementoj ili havas.

Malgraŭ strikta malpermeso de mia instruistino (unue lernu kaj lernu) mi rapide komencis traduki polajn kantojn al Esperanto kaj klopodis kanti ilin kun akompano de mia gitaro. Poste mi ne plu tradukis, sed mem skribis tekstojn por miaj kantoj. Mi skribis pri miaj plej ŝatataj temoj: Esperanto kaj esperantistoj. Tio estis iel unika. Klubo ofte invitis min por kanti en diversaj urboj. „Mia famo iris antaŭ mi.“ Ĉeĥaj kaj hungaraj esperantistoj eĉ pagis miajn vojaĝojn, por ke mi partoprenu iliajn kongresojn. Post miaj koncertoj dum UK en Varsovio itala eldonejo proponis al mi surbendigi kasedon. La kasedon sekvis invitoj al okcidentaj landoj. Tiam kanti esperante estis mia ĉefa okupo. Mi donis ĉ. sesdek koncertojn jare. Tio sufiĉis por vivteni la familion. Mi fariĝis profesia esperantisto.

Mi gvidis plurajn kursojn en skandinavio. Iufoje mi restis pli longe kaj trovis laboron en finna bieno. Tio sufiĉis por helpe de germana esperantisto aĉeti malnovan aŭton. Tiam mi povis facile akcepti inviton de francaj esperantistoj rondvojaĝi Francion dum du monatoj por koncerti en tieaj kluboj. Antaŭ la turneo mi jam mem surbendigis duan mian kasedon. La francoj ŝatis miajn koncertojn, por konservi la kantojn, aĉetis miajn kasedojn. Tio donis al mi etan kapitalon.

Kiam en Pollando ekis libera ekonomio, malmultaj homoj sciis, kiel ĝi funkcias. Al mi helpis Esperanto. En Francio mi renkontis esperantiston, kiu estis eldonisto. Li rakontis al mi pri la entrepreno. Mi lernis la metion de la samideano. Kiam alia mia amiko en Hungario donacis al mi esperantan libron „Kulturo de la amo“, mi komprenis, ke en mia lando mankas tia libro. La franca scio, hungara libro kaj eta kapitalo de la kasedo estis la bazo de mia eldonejo KLEKS, kiun mi fondis. La unua libro estis tiom sukcesa, ke KLEKS, kiu apartenis al unuaj privataj eldonejoj en mia lando, eldonis poste pli ol kvincent titolojn en la pola kaj dekkelkajn en Esperanto.

Jam kiel studento mi revis trovi laboron en esperanta redakcio de pola radio. Tio por juna samideano sonis kiel „verda ĉielo“. Mi eĉ sukcesis ĉe la lingvoekzameno. Tamen la tempoj estis tro malfacilaj por realigi la revon. Kiam en ekssocialisma Pollando venis ebleco fondi privatajn radiojn, mi tuj skribis (sepdekpaĝan) peton. Mi ricevis licencon por starigi lokan radion. Iama verda revo donis al mi novan profesion. Nun mi gvidas du lokajn staciojn. Lokaj radioj uzas la polan lingvon. Sed mi ofte liveras informojn pri la lingvo internacia. Tiel mi „repagas“ ŝuldon, kiun mi sentas rilate al Ludoviko, la verda mondo, miaj esperantaj amikoj.

Kiel prezidanto de du lokaj radioj mi renkontiĝas kun multegaj homoj. Mi estas konata en la regiono. Mi havas multajn amikojn en mia ĉirkaŭaĵo. Tamen evidente pli ol en Pollando mi havas amikojn en la mondo. En mia vivo mi renkontis multajn bonajn homojn, sed plejmulte mi gajnis dank' al renkontiĝoj kun samideanoj el diversaj landoj. Kiam homoj demandas min – Ĉu indas lerni Esperanton, se parolas ĝin mal pli da homoj ol tiuj, kiuj konas la anglan. Mi respondas – Ne temas pri nombro sed kvalito. Mia tuta vivo ne sufiĉos por ekkoni ilin ĉiujn.



Bildo de Jurij Perevalov [Lesnoj, Rusio]

En la tradicioj de nia rubriko estas prezenti, se eblas, niajn elstarajn "gastojn" ankaŭ de krea flanko. Ĉi tie ni plezure publikigas la tekstojn de kelkaj plej konataj kantoj de Georgo Handzlik. Ili estas facile parkereblaj, kaj vi povas poste kanti ilin kaj eble eĉ kanti kune kun la aŭtoro kaj kantisto dum unu el liaj famaj koncertoj.

### Ekster la mapo

Ekster la mapo estas tiu lok',  
Kie sin trovas sudo kaj nord',  
Nia fuĝejo kaj eldorad'.  
Jen ekster mapo nia land'.

En adreslibro konata nom',  
Aerbileto aŭ stacidom',  
Kaj kelkaj vortoj de tiu kant'.  
Jen ekster mapo nia land'.

Fruaj aliĝoj, kongresumad'  
Etaj literoj sur poŝtokart'  
Kaj hastaj vortoj sur telefondrat'.  
Jen ekster mapo nia land'.

Esperon studas tagon post tag'  
Ni sur la verda arkipelag'  
De pioniroj de Esperant'.  
Jen ekster mapo nia land'.

Pro la laboro, centjara pen'  
Ne, ne rompiĝos verda faden'  
Kaj venos venko por nia band'!  
Jen ekster mapo nia land'.

*Teksto: Georgo Handzlik*

*Muziko: Jan Pietrzak*



### Ni tostu amikoj

Amikoj, alvenas vespero,  
La suno jen dronas en lago.  
Ni tostu amikoj per vino esperon,  
Ni tostu la venontan tagon.

Amikoj finiĝas kongreso,  
Sed antaŭ ol hejmen ni iros,  
Ni tostu amikoj pri la neforgeso,  
Dum jar' ni renkonton sopiros.

Amikoj jen venas aŭtuno  
Naskiĝas jen, jen novaj beboj.  
Ni tostu amikoj pri verda fortuno,  
Pri iam benantaj nin nepoj.

### Ludoviko

Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko,  
Mi volas danki vin, per ĉi tiu kant',  
Mi volas danki vin, maljuna kuracisto,  
Mi volas danki vin, Doktoro Esperant'.

Pro *Verda Koro* de Julio,  
*Streĉita Kord'* de Koloman',  
Pro la kongres' en Varsovio,  
Pro renkontiĝo kun Japan'.

Pro la amikoj el Francio,  
El Germanio kaj Kanad',  
El Itali' kaj Hungario,  
Pro belulin' el Leningrad'.

Pro juna negro-komencanto,  
Kortuŝa franca melodi',  
Ĉar ĉio dank' al Esperanto,  
Ĉar ĉio, Majstro dank' al vi.

*Georgo Handzlik*

*Oni diras, ke 2008, laŭ orienta kalendaro, estas la jaro de Muso. Nia leganto el Ĉinio verkis originalan fabelon pri tiu malgranda, sed rapida besto, kaj ni komencas de ĝi ĉi-jarajn publikaĵojn de tiu ĉi rubriko.*

Jian Weijian [Guangzhou, Ĉinio]

## La museto en la hana palaco

(originale verkita fabelo)

En bela kaj majesta orienta palaco vivis unu hano, kiu ŝatis post la satiga tagmanĝo kuŝi sur litkuseno, ĝui belegan flutan muzikon kaj pensi, kiun el multnombraj edzinoj de sia haremo li vizitu kaj feliĉigu vespere.

En iu el la tagoj la hanon vizitis transmaraj negocistoj kaj donace enmanigis al li grandan pecon de speciala fromaĝo kun unika gusto. La hano volis gustumi ĝin dum la tagmanĝo kaj dume ordonis kaŝi en la bufedon ĉe la kuirejo.

Kaj en truo de la hana ĝardeno loĝis malgranda familio el du musoj: la muso-patrino kaj muso-filino kun la nomo Lusi. Tiutage Lusi diris: "Mi iru por serĉi ion bongustetan!" Post la rapida trakurado de la tuta hana palaco Lusi okazis ĉe la kuirejo, kie staris granda bufedo kaj la museto rapide sin kaŝis ene de tiu ĉi bufedo. Atente ĉirkaŭrigardinte, Lusi ekvidis grandan pecon de fromaĝo kaj ĝoje eksaltis: "Ĝuste tio, kion mi ŝatas!" Ne pensante tro longe, ŝi komencis plezure rodi la fromaĝon. Sed la peco estis sufiĉe granda, tial Lusi manĝis kaj manĝis, kaj rapide ŝi iĝis pli kaj pli dika. Fine la museto jam ne povis manĝi kaj decidis, ke estas tempo por reveni. Lusi sukcesis forlasi la bufedon kaj

la kuirejon, kiam servistoj de la hano venis tien por preni la fromaĝon kaj porti ĝin al la hana tablo. Kaj kion ili vidas! – Preskaŭ finmanĝita fromaĝo! Ili certe komencis kuri tra la palaco kaj serĉi ŝteliston.

Timigita Lusi, kiu tiutempe klopodis forlasi la palacon, ne povis penetri en la kutimajn murajn truetojn kaj trarampi tie, ĉar ĝi iĝis pli dika. Kompatinda museto sidis kaj ekploris, ĉar sciis, ke la patrino atendos ŝin kaj maltrankviliĝos. Kaj Lusi komencis multe gimnastiki: kliniĝi, sidiĝi, denove stari kaj salti, enspiri kaj elspiri... Unu-du, unu-du... Post la gimnastiko la museto jam bonorde trarampis en ĉiujn trueajn vojojn kaj denove okazis en la ĝardeno. Reveninte hejmen, Lusi rakontis al la patrino pri siaj aventuroj kaj promesis, ke plu neniam manĝos por la rezervo, sed ĉiam nur laŭmezure.



Bildo de Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Luiza Carol [Israelo]

## Kio okazis ĉi tie?

Estas frumatene, kaj la gastoj en la gastejo "Palaco" ankoraŭ dormas. Sed en la kuirejo, la kuiristino kaj la junulino kiu helpas ŝin jam komencis sian taglaboron. Ili preparas la matenmanĝon por la gastoj, kaj babilas intertempe.

— Ĉi-matene, post kiam ni disdonos la matenmanĝaĵon, ni kuiras la ranojn kiujn ni kolektis hieraŭ vespere ĉe la marĉo, diras la kuiristino. Ĝis tagmeze, ni povos aldoni al ili ankaŭ fritajn terpomojn kaj salaton.

— Ho, mi scivolos pri tio, ĉar mi neniam kuiris ranojn ĝis nun! Kie troviĝas la korbo en kiun ni enmetis ilin?

— Jen ĝi, sur la breto, apud la fenestro!

La du virinoj daŭre babilas, surmetante la matenmanĝaĵon sur du rultablojn. Poste, ili eliras el la kuirejo kunportante la rultablojn en la manĝoĉambron. Nur 10 minutojn ili malĉeestas en la kuirejo. Sed kiam ili revenas... ho, ve! Kia malordo! Kio okazis ĉi tie? Kiu verŝis la salon sur la plankon? Kiu frakasis la laktopoton? Kiu malfermis la korbon apud la fenestro? Kaj ve, kien malaperis la ranoj?

La kuiristino rigardas tra la fenestro. En la korto, gaja sciuro ludas kun la fermilo de la korbo, provante rompi tian per ĝiaj dentetoj.

\*\*\*

Vespere, en la arbaro, la rana koruso koncertas:

- Kvak-kvavak-kvak!

Al la bona sciureto

Dankas ni per la kanteto!

Kvak-kvavak-kvak!

Abomenas ni palacon!

Gloru nian karan marĉon!

Kvak-kvavak-kvak!

La strigo malkontentas kaj krias:

- Bu-hu-hu! Jen aĉa kvakado per malbona rimo!

Sed la sciuro silente ĝojas.



Bildo de Luiza Izmailova [Kuzneck, Rusio]

**Februare en multaj landoj oni festas belan, romantikan feston – Tagon de Ĉiuj Amantoj. Ĉi tie ni kolektis verkojn pri Amo de diversaj niaj aŭtoroj kaj plezure prezentas al vi.**

**Aleksej Smirnov**

Tradukis *Aleksej Bikov* (Omka, Rusio)

## Aĥ vi, Dunjka!

Tiam, en la juneco, tio estis senresponda amo.

Matene mi sportkuris en parko, kaj iu knabino promenigis hundeton, kiu nomiĝis Dunjka. Tiu hundeto galopis laŭ flakoj kaj svingis apud miaj sportŝuoj per kotitaj oreloj. Kaj la mastrino de Dunjka min tute ne rimarkis. Ĝiaj okuloj ĉiam estis tristaj, kaj responde al miaj demandoj ŝi nur movis per la ŝultroj.

Televidfilmoj pri banditoj kaj teroristoj aludis al mi, kiamaniere konatiĝi kun la knabino. Foje Dunjka flankenkuris de la mastrino kaj mi forŝtelis ĝin. La hundo okazis kaprica, multmanĝanta kaj malbone edukita bestaĉo. Ĝi postulis viandon kaj faris el mia apartamento necesejon. En la loĝejo ekodoraĉis per hundo. Ja promenigi ŝtelitan hundon mi ne povis, kaj la anonco pri la serĉata hundo ne aperadis.

Sed mi renkontis la knabinon kaj ni konatiĝis. Ĉio okazis tre simple. Ŝi estis vigla kaj agrabla, kaj mi komprenis, ke morgaŭ okazos mia venko.

Sekvontage mi venis al la rendevuo kune kun freŝkombita Dunjka. Mi diris, ke trovis ĝin kaj jam al kutimiĝis al ĝi kaj ne volas adiaŭi... Neatendite la knabino jetis al mi malican rigardon.

— Estas tre bone, vi povas ne disiĝi, - diris ŝi. — Mi vin petegas – malaperu vi kune kun tiu ĉi kaprica bestaĉo kaj mi restos dankema al vi por la tuta mia vivo. Tiu ĉi hundaĉo de miaj gepatroj venenigis al mi duonon de mia vivo.. Dume ŝi forestis, mi eksentis min la Homo. Kaj vi denove ĝin retrovis.

Ŝi ekploris. Kaj mi foriris kune kun la hundo.

Kaj ankoraŭ longe Dunjka memorigis al mi pri tiu ĉi amo per kaprica bojo.



Bildon sendis Aleksej Bikov (Omka, Rusio)

## Kio do estas Amo?

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg, Rusio)

Demandu florojn: por kio ili kreskas? Responde ili ofendiĝos, fermos siajn petalojn kaj eĉ silentos. Senresponde forkuros la rivero, nerakontinte al vi por kio ĝi strebas al la maro.

Kial vi konstante demandas: “Kio estas amo?” Kial ĝi devas pravigi sin antaŭ vi, malkaŝi sian misteron? Tiu mistero estas vidata de ĉiuj, sed por multaj ĝi estas neatingebla.

Amo estas paradoksa jam laŭsence - ĝi aperas, kiam ami ne estas eble; ĝi kreas kaj pereigas; ĉiuj parolas pri Amo, sed malofte oni renkontas ĝin.

Ni ne miras, kiam homoj disiĝas: ami longe ne eblas, ĉar la sentoj malfortiĝas. Sed okazas ja mi-

rakloj, kiam homoj amas unu la alian dum la tuta vivo kaj, malgraŭ ke tio ne devas esti laŭ ĉiuj naturaj leĝoj, - tio okazas.


Tamen, kio do estas Amo? Subita kaj nekonceptebla estas miraklo de apero de alia, dua “Mi”, por kiu vi simple elsaltas el la propra haŭto, rompante ŝelon de la egoismo kaj poste flugas...

Vi scias pri via amato pli, ol la tuta mondo kaj li ĉiam pli pravos ol la tuta mondo. Vi dronas en la amato kaj trovas vin mem en li (ŝi).

Vi... Vi... Vi...

Sed vere, kio do estas Amo?

Bildo de Jurij Perevalov [Lesnoj, Rusio]



Ĉi tiun rakonton sendis al la redakcio komencanta aŭtoro el Rusio, kiu preferas, ke liaj verkoj aperu kun aŭtora pseŭdonimo. Tio estas lia debuto sur la paĝoj de nia revuo. Niajn gratulojn!

Maks Martin

## Lasik

Lasik haste turnis la kapon kaj ĵetis rigardon tra la malfermita pordo de komputila ĉambro. *Prince of Persia* ŝanceliĝis sur la rando de balkono, sed lertaj fingroj de Lasik ne permesis al li fali. Svenjo kuris preter. Kial preter? Hieraŭ ŝi eniris, sidiĝis apud li sur la najbaran tablon kaj lastajn minutojn de labortempo tiel sidis, babilante. Preskaŭ ĉiuj geamikoj ferias aŭ oficvojaĝas, reale restis nur li, Svenjo kaj Oleg apud la ĉefenestra komputilo. Ĝis la fino de labortempo restis kelkaj minutoj – eblas iomete ludi, des pli tiu ĉi Prince estas la nova, nur hodiaŭ konatulo donis la diskon.

Lasik komencis labori en la firmao antaŭ duonjaro kaj ankoraŭ sentis sin novulo en la kompanio – la plej juna, maldika, nealta okulvitrulo. li restis ombre de aliaj junuloj: muskoleca laboristo Sergeo, sportema vigla Lenĉjo, altstatura simpatia Oleg. Eĉ la nomo Lasik – ŝerce karesa, spontane elvoĉita de unu el junulinoj – trafe algluiĝis al li. Li ne aspiris ĉiesan adoron, kiel Lenĉjo, ne logis lin virinaj korpoj, kiel Sergeo, kaj gitarludi, kiel Oleg, li ne scipovis. Li penis imponi poiom, netrude: foje drinkante pli ol aliaj, foje gajninte en komputila ludo. La kunlaborantinoj restis por li nur kolegoj, ŝajne neniu aparte interesigis lin – nek alta statura Lenoĉka, nek grandkorpa Olga, nek belulino Mariŝa, eble nur malgranda minca Svenjo. Ŝi posedis nek staturon, nek belecon, sed ial tamen altiris virajn atentojn. Kun aliaj junulinoj oni flirtis, kun ŝi – kondukis amike, kaj evidente neniu kontraŭus amikiĝi kun ŝi pli intime. Ŝi ja estis enamiĝinta en la muskoloj de Lenĉjo, kun aliaj tenis certan distancon. Onidire Sergeo jam spertis ŝian kontraŭstaron pro la tro insista ebria arogeco. Apartan intereson pri Lasik ŝi ne montris, tamen ne ignoris lin. Tiu ĉi ŝia konduto vere incitis Lasik'on. Li ne estas ordinara! Ŝi devos kompreni tion. Kaj aprezi lin. Kaj preferi lin, sed ne beletan familieran Lenĉjon – palavrulon kaj donĵuanon, flirtantan kun ĉiuj virinoj sen konsideri iliajn aĝon, staturon kaj nombron.

Antaŭ semajno Lenĉjo forveturis ferii kun vica amorantino. Sopi, ĵaluzo kaj soleco probable turmentas ŝin. Ĉu pro tio ŝi venis hieraŭ en la komputilĉambron? Kial tamen ŝi lokiĝis ne apud alta belaspekta Oleg, sed apud li, Lasik? Ĉu li plaĉas al ŝi?

*Prince* falis en abismon, penanta transsalti ĝin. Lasik blasfemis. Ĉu kvanto da muskoloj povas superi saĝon, talenton, ambicion? Cetere, li, Lasik, ne estas malfortulo. Mallarĝaj ostozaj ŝultroj facile portas pezan dorsosakon, kaj la gamboj scipovas dum horoj senlace futbalumi. Ŝiajn kvardek kilogramojn li sen streĉo



portos... ekzemple ĝis proksima kuŝejo.

Lasik ankoraŭ turnis la kapon. Neniu. Ŝi simple preterkuris kun dokumentoj. *Prince* denove mortis, ĉi-foje murdita de giganta monstro.

Kaj kiam li, Oleg kaj Lenĉjo premadis klavarojn de komputiloj, penante ĝajni ree kaj ree, ŝi blinde sidis apud Lenĉjo, ne rimarkante, ke ĝuste Lasik gajnas pli ofte.

La impetaj fingroj haltis super la klavaro. *Prince* rigidiĝis, levinte la livan gambon. Lasik metis la kapon sur la manplatojn. Kiomfoje li provis kontakti kun ŝi: babili, akompani hejmen, eĉ interbatiĝis kun Lenĉjo pro tio, ke li iel plorigis Svenjon. Ĉiujn liajn provojn amindumi ŝi akceptadis same indiferente, kiel de aliaj junuloj. Sed li, Lasik, ne estas alia! Tiufoje dum naskiĝfesto de Oleg, kiam ebria Lenĉjo foriris kun Svenjo kaj poste ŝi revenis ploranta, Lasik vere furiozis. Li aliris Svenjon, metis brakon sur ŝiajn ŝultrojn, parolis ion ŝercan, sed ŝi ne reagis. La korpo de Lasik ekskuis, io varmega inundis la sinon, la kapo iĝis klara, kvazaŭ li ne drinkis dum la tuta vespero... Pro ŝi li batus iun ajn.

Paŝoj. La paŝoj, kiujn li atendis jam delonge. Lasik levis la kapon de sur la manplatoj. Ĉe la tablo staris Svenjo. Ŝia mola grizokula rigardo voris la ekranon de lia komputilo.

– Vaŭ! – diris Svenjo, – Nova *Prince of Persia*! Ĉu estas via?

– Mia! – iom impertinente respondis Lasik. Lia spiro haltis ie en la stomako, la koro bategis tiel, ke ŝi certe aŭdis ĝian bategon.

– Donu la diskon, – petis Svenjo.

Lasik dum kelkaj sekundoj ŝajnis serĉadon. La disko kuŝis tute proksime, inter dokumentoj, sed Svenjo neniaokaze rimarku ĝin.

– Mi la diskon hejme forgesis.

Jam konata varmego denove inundis la korpon. La mincaj, ĉiam malvarmaj fingroj ardiĝis...

\*\*\*

...Rigidaj fingroj mallerte turnas la ŝlosilon en la seruro. De sur la pli supra etaĝo iu malrapide descendas.

– Eniru!

Lasik haste fermas la pordon.

Svenjo haltas post du-tri paŝoj enen kaj grimacas pro peza fum-vinodoro de fraŭla loĝejo.

– Ĉu kurtenojn vi pigras disigi?

– Pigras... – Lasik ridetas.

– Kaj la liton... ordigi...

Lasik aliras ŝin, ĉirkaŭpremas la ostozajn ŝultrojn. Svenjo nevole streĉiĝas kaj konvulsietas. En la grizaj okuloj fulmas timemo. Lasik prenas la fajnan korpeton sub la gluteoj kaj levetas iom, tiel, ke iliaj vizaĝoj okazas apude. Ŝi trankviliĝas kaj cedas milde. Li fermas la okulojn kaj tuŝetas per siaj lipoj la lipojn de Svenjo. Ŝiaj lipoj obeeme malfermiĝas renkonten...




Bildo de Naila Sadretdinova [Voronej, Rusio]

*Ni esperas, ke multaj el malnovaj legantoj sukcesis aprezi originalajn E-lecionojn, kiujn verkas por "K" nia fidela aŭtoro el Francio Johan' - Luko Tortel. La aŭtoro mem nomas ĉi tiujn lecionojn, kiuj baziĝas je analizo de Zamenhofaj proverboj, tre simple - babiladoj. Novaliĝintajn legantojn ni alvokas deligente studi la "babiladojn" kaj evolui en la lingvoscio!*

## Babilado 16

Johan' - Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]



Saluton kaj bonan jaron 2008-an al ĉiuj gekomencantoj!

Kial ni diras: "Saluto-N kaj bona-N jaro-N", kaj ne "Saluto kaj bona jaro"? Ni kutimas aŭdi la respondon: "ĉar [ni deziras] saluto-n [komplemento], do -N estas necesa".

Ja vere; sed oni ankaŭ tute logike povus pensi: "Saluto kaj bona jaro" [estu por vi] aŭ [okazu por vi] aŭ [venu por vi]...

Kial do ni havas en nia Esperanto la unuan manieron? Ĉar elekto estis necesa inter ambaŭ diroj, kaj Zamenhof elektis la unuan, pli familiaran al li tra unu lia denaska lingvo, la germana (tra la jida, aŭ judgermana).

La kultura origino de nia kara "pra-avo" Ludoviko Zamenhof vid-eblas ankaŭ en kelkaj proverboj liaj. Ekzemple:

*Al farun' malbonspeca ne helpas la spico (25)*

Tiu proverbo klarigon ne bezonas, ĉu ne? Sed ĝi entenas apartaĵon propran al la rusa (inter aliaj) lingvo. Ni vidis en la unua babilado, ke ofte proverboj havas internan rimon. Ĉi tie ni havas: "...speca ...spico".

**Parnasa Gvid-libro** de Kalocsay (eble la plej granda poeto en Esperanto) kaj Waringhien (vortaristo, gramatikisto, poeto, tradukisto... la dua plej grava esperantisto post Zamenhof) (Parnaso: loĝejo de Apolono kaj Muzoj) — nepre necesa libro se poezio interesas nin — difinas rimon:

*Sameco de la lasta akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj sonoj*

Ni klare vidas, ke *speco* kaj *spico* ne vere rimiĝas; estas nur simileco de konsonantoj. Tamen tia kvazau-rimo estas uzata en la rusa poezio kaj estis enkondukita en Esperanton de rusaj poetoj, kiel Miĥalski aŭ Ljubin. Tio ne estas (aŭ tre malmulte estas) uzata de ne-slavaj poetoj, kaj klare indikas, ke Ludoviko estis slav-kultura.

Oni povus al-doni (plu-diri) ion pri la ritmo de tiu kvazaŭ-verso, kiu "muzik-igas" ĝin. La sekvo de akcentataj kaj ne-akcentataj silaboj donas ian valsan ritmon:

Al-fa-run'-mal-bon-spe-ca-ne-hel-pos-la-spi-co

pro la sekv-ado de 4 "piedoj" (elemento de verso, versero) montr-antaj du ne-akcent-ataj silaboj (indik-itaj per o) kaj unu akcentata (indikita per —):

al-fa-run / mal-bon-spe / ca-ne-hel / pos-la-spi / co

o — / o o — / o o — / o o — / (la lastan silabon — ĉi tie: co —oni neniam en-kalkulas en versoj se ne-akcentata).

Tiu piedo (o o —) havas tradician nomon: *anapesto*; domaĝe, oni povus preferi: valso-ritmo aŭ vals-ero!

Ni fine notu la mal-aperon de la fina -o de faruno: ĝia konservo rompus la ritmon, kiel mis-paŝo de mal-lerta dancanto.

*Don-ado de almozoj neniam mal-riĉ-igas (371)*

Ni oft-ege renkontas la vort-eton -IG- en Esperanto. PMEG (vidu babiladon 10-an) perfekte diras:

**Tio, kio staras antaŭ IG, montras la rezulton de la ago (p. 559)**

Do: donado de almozoj neniam faras [nin] malriĉaj

*Kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano (975)*

Do: faras ĝin perej

*Kiu rompjis la glason, ordigu la kason (1093)*

Do: faras ĝin en ordo (pagu).

Malriĉa estas adjektivo (a-vorto), perej estas verbo (ag-aŭ stat-vorto) kaj ordo estas nomo (o-vorto): ne gravas tiu diferenco, ĉiuj montras la rezulton. Do ni memoru la ĉi-supran frazon de PMEG. Eble ni povus trovi ian kvazaŭ-verson por pli bone memori ĝin:

Kio staras antaŭ IG, de rezulto jen indik'

—o—o—o—, o—o—o—

Hm! ne tre bela verso, pro du motivoj: *de* neniam portas fortan akcenton, do la ritmo iom mal-fort-iĝas; oni nomas tion: *ŝvebo*, en poezio; due la rimo IG-ik havas nur proksiman, sed ne similan sonon; oni nomas tion *rimoido* en poezio. *Ŝvebo* kaj *rimoido* estas preskaŭ neeviteblaj en iom longa poemo, do ne malofte uzataj; sed en unu sola verso oni devus eviti ilin kaj pli bone trovi. Eble iu el ni sukcesos pli bonan solvon.

Don-ado: ni ankaŭ oftege renkontis -AD, kiu indikas:

la ripetadon, kiel en nia proverbo;

la kutimon: *mi ĉiu-dimanĉe vizitadas mian patrinon*;

la daŭron: *la grimrado de la monto estis longa*.

Tiu babil-ADo sufiĉu por hodiaŭ! Ĝis!

Johan'-Luko

En tiu ĉi tradicia rubriko jam estis publikigitaj antaue variaj materialoj : rakontoj pri popolaj tradicioj, pri diversaj urboj, pri vivo kaj io interesa de diversaj lokoj de la mondo. Nia malnova leganto kaj aŭtoro V. Opletajev proponis rakonti pri diversaj simboloj, kiuj ekzistas en ĉiu lando kaj sendis sian kontribuon, en kiu rakontas pri mondefama rusa simbolo. Ni invitas ĉiujn niajn legantojn kontribui por la rubriko per diversformaj materialoj pri la simboloj de via lando aŭ popolo !

Simboloj de Rusio.

## Matrjoŝko

*Matrjoŝko - tradicia rusa ligna ovalforma bunte kolorigita pupeto kunmetebla el du partoj kaj interne entenanta de du ĝis plurdekaj da aliaj pupetoj. Angle: Matryoshka, france: Matriochka, germane: die Matrjoschka.*

Ŝajnas, ke matrjoŝko - tradicia rusa popola pupo - devenas el tre foraj tempoj. Sed efektive nur antaŭ pli ol cent jaroj Je. Mamontova, mastrino de la fama bienejo en Abramcevo, dum sia vizito en Japanio rimarkis originalan munteblan figureton de budha sanktulo Fukuruma - ĝojplena gaja kaj saĝa oldulo kun la kalva kaj pro multa pensado malproportie granda kapo. Ene de la figureto troviĝis ankoraŭ kelkaj similaj sed malpli grandaj objektoj. La japana ludilo tre plaĉis en Rusio ne nur al infanoj sed ankaŭ al plenkreskuloj kaj fariĝis modelo por la fama rusa matrjoŝko. Eble, ĉar ĝia ovala formo asociiĝis en nia lando al tiutempe tre popularaj paskaj lignaj kunmeteblaj ludiloj-ovoj.

La unua matrjoŝko estis fabrikita fine de la 19-a jarcento en la metiejo "Infana edukado" de A. Mamontov en Apudmoskvo. Tiun ĉi lignan pupeton faris tomisto Vasilij Zvjozdoĉkin, kaj ĝi estis kolorigita laŭ la skizoj de konata pentristo Sergej

Malutin. La unua matrjoŝko estis okobjekta kaj imitis knabinon en sarafano kun kaptuko, tenantan en la mano nigran kokon. La frontan knabinon sekvis knabo, post kiu denove estis knabino ktp. Ĉiuj figuretoj diferencis inter si, kaj nur la oka, malpli granda ol etfingro, prezentis vinditan bebon.

La nomo matrjoŝko revenas al malnova rusa virinano Matrjona sed kun iom diminutiva kaj karesa senco, sed la vorto mem originas el la latina lingvo, ĉar en antikva Romo ĝi personigis nobelan patrinon aŭ maturaĝan, alte respektatan sinjorinon. Sekve, la ŝatata ligna ludilo implicas hejmecon, fekundon, eternan vivon.

Dum la pasintaj cent jaroj la pupeto populariĝis tiom, ke ĝi fariĝis rusa nacia memoraĵo, kiu simbolas gastamon, amikemon, bonvolemon de la popolo. La rusa matrjoŝko unufoje prezentis sin eksterlande en 1900 en la Tutmonda ekspozicio en Parizo, al-

tiris tie ĉies  
atenton  
p r o

sia neripetebla originaleco kaj ricevis medalon.

Nuntempe en Rusio matrjoŝkoj estas fabrikataj en pluraj urboj. La plej konataj kaj malnovaj metiejoj kaj fabrikoj troviĝas en Sergiev Posad (Moskvo), Semjonov (provinco de Nijnij Novgorod), Kirov. Por produkti matrjoŝkojn oni prenas altkvalitajn betulajn aŭ tiliajn ŝtipojn, al kiuj tomistoj artisme donas tradician ovalan formon. La pupetoj povas aspekti nun diverse kaj respeguli tendencojn de aktualaj naciaj kaj eĉ politikaj eventoj kaj personoj. Foje ili estas tre malgrandaj kaj nur unuobjektaj, sed foje oni povas vidi eĉ grandegulinojn kvindekobjektajn. Ankaŭ la teknologio de pupkolorigado kaj dekorado povas esti tre ordinara, kiam oni uzas nur guaŝon sen posta lakado, aŭ komplika pro uzado de anilinaj farboj kun ornamaĵoj el maldikaj oraj folioj.

La populara rusa matrjoŝko fariĝis en la dudekunua jarcento objekto de altkvalita industria produktado, ligita kun eksporto kaj turismo, sed ĉiukaze ĝi fariĝas fajna verko nur dank' al talento kaj diligenta laboro de pluraj majstroj: de lignohakisto kaj tomisto fajnanta lignan pecon ĉe stablo ĝis pentristo, kiuj ame kaj dorlote produktas al ni ĉi tiun neripeteblan simblan rusan artaĵon - nepran ĉeestajojn en ĉiu domo kaj en ĉiu loĝejo.

Vladimir Opletajev (Surgut, Rusio)



# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



*Karaj legantoj! Ni havas eblecon prezenti ĉi tie ankoraŭ unu el la talentoj de nia ĉi-numera „gasto”. Georgo Handzlik afable sendis kelkajn el siaj multaj unikaj aforismoj verkitaj originale. Ili estas unikaj ĉar temas pri Esperanto kaj esperantistoj. La aŭtoro mem nomas ilin – „verdeskaj pensoj”*

**Georgo Handzlik** [Bielsko – Biala, Pollando]

Ni konas la daton de apero de la unua libro, sed ne la daton de la fina venko aŭ de la fino. Tamen ĝuste en la epoko inter tiuj ĉi datoj ni vivas la plej belan parton de nia vivo.

\*

La interna ideo fakte estas nia religio. Kiel ĉie, troaj fundamentalistoj estas danĝeraj.

\*

Ĉu rigardi nur en si mem estas kongrua kun la interna ideo?

\*

Esperanto estas kiel jetaviadilo, en epoko kiam la vojaĝantoj ankoraŭ kontentiĝas per rapida ĉevala poŝto.

\*

Pli facile fanfaroni pri la deksex reguloj ol obei ilin.

\*

Intelektulo estas homo, kiu sen bezono lerni Esperanton povas aserti, ke ĝi ne taŭgas por komunikado.

\*

Rezulte de mil varboj ekestas unu esperantisto. Tio estas nia vojo al la fina venko. Tiel ni devas obstine kaj nehaltiĝante.

\*

Ne multaj konscias, ke post la fina venko evidente devas morti la interna ideo. Kion ni do celu.

\*

Esperanto ĝis nun malvenkas dank' al armeo...  
de filologoj...  
de aliaj lingvoj.

\*

Ne kion Esperanto povas doni al mi? Sed kion mi ...

\*

Deksex reguloj kaj kiom multe da ĝuo.

\*

Deksexregululo.

\*

Esperi, ke nur simpla gramatiko sufiĉas por iam atingi finan venkon, estas sama stultaĵo, kiel opinii, ke akvomuelejo estas konvena veturilo, ĉar ĝi havas la radon.

\*

Pli facile akcepti la Internan Ideon ol ĝuste uzi la participojn.

\*

Esperanto venkos malgraŭ la esperantistoj.

**Peter Miles** [Londono, Anglio]

Sukceso estas ricevi kion vi volas,  
feliĉo estas voli kion vi ricevas.

La bona afero pri egoismuloj estas  
ke ili ne parolas pri aliaj.

Genio faras kion ĝi devas, talento –  
kion ĝi povas.

Bestoj estas tiel agrablaj amikoj –  
nek demandante, nek kritikante...

Feliĉo kompensas per alto kio al ĝi  
mankas en longo.

Ofte la plej bona metodo gajni  
estas forgesi poentumi.

La cerbo estas mirinda organo. Ĝia  
laboro komenciĝas ekde la  
momento  
de ellitiĝo kaj dauras senĉese ĝis  
oni atingas la oficejon.

Sendis al „Komencanto” **Bill Thorne**  
[Londono, Anglio]  
El la arkivo de la redakcio.

-Ĉu mi povos ludi pianon, kiam mia  
brako resaniĝos?

-Jes! Sendube!

-Bone! Mi ne scipovis ludi ĝin antaŭe!



Bildo de **Bill Thorne** [Londono, Anglio]

## Homaro dividiĝas je viroj kaj virinoj.

Arkadij Inin. Esperantigis el la rusa Eva Ozerova [Orehovo-Zuevo, Rusio]



Homaro dividiĝas je viroj kaj virinoj, kaj tio okazas eĉ ne lau signoj de aspekto, sed tute alimaniere.

Viroj estas estaĵoj ĉiam kontentaj pri tio, kion ili havas, kaj virinoj, male, ĉiam malkontentas pri tio, kion ili posedas. Ekzemple: viroj, kiuj jam estas edzoj, ne strebas al libero, kaj estante liberaj ne strebas al edziĝo. Tiuj viroj, kiuj estas dikaj, ne klopodas maldikiĝi, sed estante maldikaj, ili same ne deziras dikigi. Tiuj viroj, kiuj loĝas en vilaĝo, ne revas pri urbo, sed tiuj, kiuj loĝas en urbo ne tre strebas al vilaĝo.

Kaj male, virinoj kutime en familia vivo revas pri libero, sed estante liberaj denove serĉas "kaptilon" kaj ŝatus havi familion. Virinoj persiste liberiĝas de superfluj kilogramoj, se ili estas dikaj, kaj avide akiras kilogramojn se ilin oni konsideras maldikaj. Tiuj virinoj, kiuj loĝas en vilaĝo revas pri urba vanto, sed, loĝante en urbo, ili sopiras pri vilaĝa silento.

La plej interesa estas tio, ke ĉiuj, kiujn mi rilatigis al viroj, eĉ povas havi virinajn aspektsignojn, kaj, male, kiujn konsideris virinoj, en realo fieras pri sia vireco. Se vin plene kontentigas,

ke via meblo dum la jaroj staras sur la sama loko, tio signifas, ke vi estas viro, eĉ se vi havas virinan nomon. Sed se vi ĉiam havas deziron ŝanĝi la lokojn de viaj tablo kaj ŝranko, do, sendube, vi estas virino, eĉ se vi havas viran nomon.



Bildo sur la paĝo de Luliza Izmaĵova [Kuzneck - Rusio]

Alivorte, esti viro – ne signifas nur rilati al virseksa duono, sed gravas esti individuo kun konstanta kaj profunda kontento pri sia statuso. Ankaŭ esti virino – ne signifas nur rilati al virinseksa duono, sed signifas esti la fonto de ĉiama malkontento kaj deziro de ŝanĝoj.

Kion eblas konkludi el ĉio ĉi? Stabileco de nia vivo kaj garantio de neantaŭvideblaj ŝanĝoj – ekzistas dank` al viroj. Sed se la tuta homaro konsistus nur el viroj, ni ĝis nun trankvile sidus en antikvaj kavernoj. Sed ni eliris el kavernoj nur dank` al ŝanĝigemaj kaj energiaj virinoj.

Esperantigis el la rusa Raja Kudrjavceva [Jekaterinburg, Rusio]

## Eltrovaĵoj de viroj kaj de virinoj.

Viro eltrovis armilon kaj elpensis ĉasadon;

virino eltrovis ĉasadon kaj elpensis felojn.

Viro eltrovis kolorojn kaj elpensis pentroarton;

virino eltrovis pentroarton kaj elpensis kosmetikon.

Viro eltrovis vorton kaj elpensis paroladon;

virino eltrovis paroladon kaj elpensis klaĉojn.

Viro eltrovis agrokulturon kaj elpensis manĝaĵojn;

virino eltrovis manĝaĵojn kaj elpensis dieton.

Viro eltrovis amikecon kaj elpensis amon;

virino eltrovis amon kaj elpensis geedziĝon.

Viro eltrovis virinon kaj elpensis seksumadon;

virino eltrovis seksumadon kaj elpensis kapdoloron.

Viro eltrovis komercon kaj elpensis monon;

virino eltrovis monon... kaj de tiu tempo komenciĝis

ĉiuj problemoj !

\* \* \*

**Karaj legantoj! Ĉi-sube ni proponas al vi kelkajn taskojn aŭ amuzaĵojn, rilatajn al lingvaj, kie ja vi povus uzi kiel helpilon dum viaj klubkunvenoj aŭ kursoj por pliperfektigi en la internacia lingvo.**

Vi devas elpensi vortojn, konsistantajn el kiel eble multaj vortelementoj.

Ekzemple: kok –id –in –o (4 elementoj) ;

mal – varm –ig –il –o (5 elementoj);

fi –aĉ –ul –in –et –o (6 elementoj).

Do, kiu elpensos la plej longan kaj interesan!

\* \* \*

Vi scias, ke en esperanto estas kunmetitaj vortoj, ekzemple: tagmanĝo, finlegi, stratangulo, buterpano, fervojo k.t.p.

Ni proponas al vi traduki la sekvajn vortoparojn, sed ne simple –vi tradukos la rektan varianton kaj la inversan:

1) jarcento – centjaro;

2) arbfolio – foliarbo ;

3) lignofajro – fajroligno ;

4) meznokto – noktomezo ;

5) piednuda – nudpieda ;

Kaj nun provu mem trovi similajn vortoparojn! Vi povas sendi viaj eltrovaĵojn al la redakcio kaj ni publikigos ilin .

\* \* \*

### Preseraroj.

Legu kelkajn proverbojn, prenitajn el la libro “Gaja leganto per esperanto” ( de P. E. Schwerin) kaj trovu preserarojn kiujn necesas korekti, ŝanĝinte nur unu malkorektan literon:

1) Ne ĉio, kio brulas estas ero.

2) Se du faras la sumon, ĝi ne estas la fama.

3) Ne velas kokino al festeno, sed oni ĝin tretas perforte.


4) Lerni poemojn partere estas bona rimeno por perfektigi en esperanto.

5) Oni loĝas muŝon per lardo, knabon per lukso, knabinon per dolĉaj vertoj.

\* \* \*

La sekvan taskon sendis al “K” nia legantino el Kazaĥio Ĵanalieva Zuĥra:

Alistarigu librojn sur la breto tiel, ke rezultiĝu proverbo pri libroj.



Mi estas 33-jara viro. Mi studas por iĝi denta kuracisto. Interesoj: piedpilko, legado, amikeco, parkoj. Mi loĝas en la urbo, kiu situas proksime de lago Viktoria. Mankas al mi lerno-materialoj pri Esperanto.

s-ro Baraka **ELINS**  
PO Box 2650  
Mwanza, Tanzania  
esperanto\_vek@yahoo.com

\*\*\*

Lernantoj de Esperanto inter 15 kaj 19 jaroj, kiuj interesiĝas pri turismo, sportoj, vojaĝoj, komputiloj k.t.p. deziras korespondi kun esperantistoj el diversaj lokoj.

Dankon flanke de ilia gvidanto Mramba Simba <simbamramba@hotmail.com>

**Esperanto – Klaso.**  
Salama Sekondary School,  
P.O. Kesto 51, Bunda, Tanzanio

\*\*\*

Mi estas 40-jara viro, kristano. Mi deziras korespondi kun kristanoj. Interesoj: lingvoj, metiartaĵoj, poŝtmarkoj, pentrado, papertrancĵaĵoj, ĉinstilaj plektaĵoj, libroj, manĝaĵoj, ĉinaj tabak-boteloj, kristanismo.

s-ro **Zhangci**  
Shijiazhuang-urbo  
Hebei-provinco, Ĉinio  
Zhangcily@yahoo.com

\*\*\*

Mi estas 28-jara instruistino, komencantino. Interesoj: vojaĝoj, kulturoj, kutimoj, korespondado, Esperanto. Mi korespondas per paper-poŝto. Aĝo kaj sekso ne gravas! Pecs situas sudokcidente en Hungario.

s-ino Eva **HENCZ**  
Maleter Pal u. 74. 3/10  
7632 PECS, Hungario

\*\*\*

Mi estas 55-jara virino, eksedziĝinta. Mi laboras. Miaj hobiaj: bicikli kaj ekskursi eksterlanden. Inter aliaj mi jam vojaĝis en Ĉinio, Grekio, Francio. Mi ŝategas maron, montaron, naturon kaj muzikon. Inter Esperantistoj mi volus trovi verajn geamikojn. Somere mi tre volus viziti iu ajn landon. Mi gastigos interŝanĝe kontraŭ gastado.

s-ino Elzbieta **SOLAK**  
Opole, Pollando  
elasolak@gmail.com

\*\*\*

Mia edzino kaj mi, estas emeritoj. Ni havas etan loĝaŭton. Ni deziras korespondi kun samideanoj (simpla vivmaniero) en Eŭropo por viziti ilin.

Max **CLAUDE**  
317, Chemin du Castellas  
84200-CARPENTRAS  
Francio  
max.claude2@wanadoo.fr

\*\*\*

Mi estas 23-jara studentino, komencanto. Interesoj: legado, sportoj, muziko.

Zsuzsanna **SOMOGYI**  
Debreceni 21  
Nyirbátor, Hungario  
zsizsi07@freemail.hu

\*\*\*

Mi estas 45-jara virino, komencanto kaj lernas Esperanton sola.

Interesoj: ĝardenado, ekologio, biciklado, skiado, interkomunikado kaj vojaĝoj. Mi deziras gekorespondantojn pli malpli sam-aĝajn. Mi volas ricevi paper-poŝton.

Eleanor **Rae**  
72 Lyttelton Street  
Spreydon, New Zealand

\*\*\*

Mi estas 26-jara kanada fraŭlo, komencanto, kaj mi volas interŝanĝi bildkartojn, leterojn kaj fotojn kun geesperantistoj de aliaj landoj, speciale orienta Eŭropo, Afriko kaj Azio. Sed mi respondos al ĉiu, kiu skribos al mi.

Mi interesiĝas pri muziko, legado, skribado, kaj fotografio. Mi volas ricevi bildkartojn kaj fotojn de aŭtoj, domoj, kastejoj, pontoj, kaj belaj ejoj for de mia lando. Mi preferas paper-poŝton.

Paul **MACPHERSON**  
RR#4 New Glasgow, NS  
B2H 5C7 Kanado

\*\*\*

Mi estas 35-jara meznivela esperantisto. Desegnisto, programisto. Miaj ĉefaj interesoj estas amikeco kun homoj el la tuta mondo, scii pri iliaj landoj, kutimoj k.t.p.

Mi estos preta por respondi vian leteron.

Julio **Canel**  
6a. Avenida 3-67  
u. Gvatemalo, Gvatemalo  
julio.canel@gmail.com

\*\*\*

Mi estas 48-jara komencantino. Mi ŝatus korespondi kun virino aŭ viro en Ĉinio. Mi ŝatus interŝanĝi ideojn kaj korespondi en Esperanto. Mi ekdelonge deziras vojaĝi al Ĉinio. Mi planas vojaĝi en aŭtuno 2008 al la regiono de Anhuĵ kaj viziti Huanshan. Mi lernas ĉinan lingvon dum 4 jaroj ĉar mi multe ŝatus la muzikon de la lingvo kaj la ĉinan kulturon. Interesoj: arto, ĉina medicino.

s-ino Martine **Maurer**  
3, rue Georges Bovet 26400 Crest  
Crest, Francujo  
maurer.martine@wanadoo.fr

\*\*\*

Mia nomo estas Daniel, mi estas 28-jara meksikano. Mi esperantiĝis antaŭ 3 jaroj, kaj nun mi instruas esperanton en mia universitato. Mi estos metalurgia inĝeniero. Min interesas teruraj rakontoj kaj enigmoj. Krom serĉi saminteresulojn, nun mi serĉas samideanojn, kiuj iros al la 7a TAKE en Montrealo.

s-ro Daniel Moreno **Martinez**  
Nezahualcoyotl, Meksiko  
daniel.esperanto@hotmail.com

\*\*\*

Mi estas irana 19-jara viro, komencanto. Mi serĉas geamikojn tutmonde.

Mostafa **Afsharpoor**  
Tabage 2 Gharbi, No: 36, Faz: 6,  
Shahrak Daneshgah,  
Jade Makhuse Karaj,  
Tehran, Iran  
mostafaafsharpoorlinkinpark@yahoo.com



Bildon sendis: Ŝulepov Aleksandr  
[Verhoturje, Rusio]

# Georgo Handzlik

“la Bardo sen barbo”

aŭtoro de kantotekstoj kaj muziko; kantisto, kiu kun akompano de propra gitaro prezentas proprajn kantojn sur scenejoj de Esperantujo.

Admirinde li kantas pri ĉiuj facetoj de vivo de la verda popolo, mirinde esprimante siajn emociojn en tiuj kantoj. Jen, plena de dankemo, la kanto memore al Ludoviko, jen moko pri Mok-Turismo de iu esperanta vojaĝoficejo, jen rememoroj pri amikoj de iama kongreso... Facile memoreblaj kantoj, agrable sonanta voĉo de la kantisto, elvokas ĉe vi fortan deziron kanti kune kun li.

Lian KD-n “Ni tostu la verdan fortunon”, kies kovrilon vi vidas ĉi tie, dezirantoj povas mendi ĉe libroservo de UEA.

G. Handzlik estas konata ankaŭ kiel instruisto, eldonisto, verkisto. Inter multaj liaj talentoj kaj kapabloj forte impresas liaj humursento kaj spriteco. Esprimitaj en liaj aforismoj pensoj kaj sentoj respegulas liajn sintenojn aŭ reagojn al iuj okazaĵoj aŭ eventoj de E-mondo. Ili ankoraŭ ne aperis libroforme (sed ni esperu!), nur parto de ili estis publikigita en revuo “La Ondo de Esperanto” kaj en tiu ĉi kajero de “Komencanto”.



Karaj legantoj! Tiel aspektas la kovrilpagxo de KD de Georgo Handzlik “Ni tostu la verdan fortunon”, kiun dezirantoj povas Mendi ĉe libroservo de UEA.

Foto de Sergej Tureckij [Ĉeboksary, Rusio]